konscienco de sciencisto igis lin diri sian vorton. Kaj tio estis vera glorago.

*

* *

En malfrua aŭtuno de la jaro 1618. oni enkarcerigis la sciencistion. Li komprenis per kio tio finiĝos, sed li brave atendis sian sorton. En februaro de la jaro 1619. la juĝistaro verdiktis: la akuzito pri herezo doktoro Luĉilio Vanini estas kondamnita je mortekzekuto...

La ekzekutoroj malice ĝojis: finfine do venis la horo de kvitiĝo kun la herezulo, kiu arogis igi duba tion, kion instruas la eklezio.

... Alte saltleviĝis la inkvizicia punfajro, aranĝita sur unu el placoj de Tuluzo. Forbruligi vivan montriĝis nesufiĉa al la ekzekutistoj. Antaŭ ol irigi lin en la punfajron, ili elŝiris lian langon...

Tiel pereis Luĉilio Vanini. Lia aĝo estis tridek kvar jaroj.

(El la rusa tradukis A. Zisman)

## PRI LA ARTIKOLO „VORTOFTECO"

**(A. W. Thomson, Scienca Revuo, Vol. 19, n-ro 2)**

Antaŭ ĉio mi deziras gratuli s-ron A. W. Thomson pri lia zorga analizado de la vortmaterialo entenata en FABELOJ IV de Zamenhof. Tiaj studoj estas vere utilaj kaj instruaj. Ankaŭ tre interesa la sugesto fontanta el tiu studo, nome ke kompostistoj povus ŝpari monon, se la presejoj enkondukus la tipojn LA, KAJ, DE, EN. Pri kio mi ne povas konsenti kaj kontraŭ kio mi dezirus averti, estas la sugesto, ke en nova eldono oni korektu kelkajn esprimojn arkaismajn — aŭ eĉ lingvajn erarojn (laŭ la nun akceptata normo). Evidentajn preseraroјn oni rajtas korekti, sed ĉion ceteran en la lingvaĵo de Zamenhof oni devas skrupule respekti, ĉar temas pri historiaj tekstoj kaj ĉiu leganto de tia libro havas la rajton konatiĝi kun ĉiuj detaloj de la idiomo, kia ĝi estis en la unua epoko de nia lingvo. Tio ne nur validas por la Zamenhofaj tekstoj, sed ankaŭ por verkoj de aliaj klasikuloj, kiel KABE, GRABOVSKI, k.c. — Se temas pri didaktikaj eldonoj (por lernantoj), oni ja povas fari notojn piede aŭ apendice, sed neniel anstataŭi la tekston mem. Pri tio indas legi kion G. Waringhien skribis en „Lingvo kaj Vivo" sub „Editoraj Demandoj". Kion li tie rekomendas estas la sole honesta procedmaniero.

**E. Sonnenfeld**



EL SCIENCA REVUO de Internacia Scienca Asocio Esperantista,
Vol. 20 (1969.), n-ro 1

617.7 (katarakto)

## KION ONI SCIU PRI LA KATARAKTO

**(prelego en Internacia Somera Uiiversitato, Rotterdam, 1967)**

**(A. Allbault, Toulouse, Francio)**

Por kompreni la naturon de katarakto kaj la cirkonstancojn de ĝia operacio, necesas koni unue la anatomion ĉefe de l' kristalino kaj due la diversajn specojn de tiu malsano.

### I. ANATOMIO DE L' KRISTALINO KAJ DE TIES ZONULO

a) **La okulo.**

La kristalino estas natura enokula lenso kun varianta refraktopovo, dank'al kiu la okulo povas konverĝigi lumofaskon elsenditan de punkto situanta je diversa distanco sur la retinon. Tiu ĉi estas sensiva ekrano, de kiu la opta nervo transdonos al la postera* poluso de l' cerebro la lumimpresojn ricevitajn sur ĉiu el la retin-punktoj.

Tamen la ĉefa okul-dioptro estas la korneo, kiu multe pli forte — sed nevarie — refraktas la lumon. La okula aparato estas kompletigita de diafragmo situanta ĝuste antaŭ la kristalino kaj konstituita de l' iriso kaj ties aperturo: la pupilo.